

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA KATALUNA ESPERANTISTA
FEDERACIO KAJ DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

EL XIV CONGRÉS DE K. E. F. A SÖLLER

♦ ♦ ♦ ♦ ♦

Els esperantistes mallorquins altra vegada han volgut que el Congrés de la Federació Catalana d'Esperantistes tingui lloc a la bella Illa Daurada, el record de la qual desperta en els esperantistes que assistiren el XII Congrés de Palma la bellesa que tant a dojo la Natura ha escampat en aquella terra envejable. Sòller, la més bella ciutat de Mallorca, serà l'escenari de la nostra festa anyal i dels XIII Jocs Florals Internacionals, els dies 5, 6 i 7 de juny de 1927.

El nostre gran Russinyol diu a «La illa de la calma»: Anant de Deià a Sòller, si quan s'hi va és per la primavera, així que s'és a dalt del coll se sent pujar, d'allà la plana, una gran flaire de tarongina.

S'avença, tot fent giragonces, i en arribar al darrer revol, com si et diguessin «Obre el cor», et donen a respirar una alenada de flors que t'ompla els sentits de fragància.

De dalt fins a baix, d'aprop fins al lluny, del pla fins a la muntanya, extenen al davant teu una panera de tarongers com un present de meravelles.

Tarongers petits, tarongers grans, tarongers verdosc, tarongers cobalt; allà on arriba la vista no veus més que puntets verdosos, de fulla fosca i de flor blanca, i les cases, les tanques, les masies i els camins tot està colgat pels tarongers.

La ciutat de Sòller és això: un estotx, una copa o una capella per a guardar el tresor d'aquests arbres.

Si vols tenir una idea del que és aquella vall, tanca els ulls per un moment i pensa en un país de verdor, mentre flaires tarongina o et menges una taronja.

Sòller té una bona plaça, té les cases nêtes i boniques, com totes les de Mallorca, té patis amb testos i pilastres, té una església gran, carrers ben grans, carrers ben cuidats; però tot ho ofeguen els tarongers. Tot el demés serveix de marc per a fer-ne destacar la fruita.

Per això el nom d'aqueixa fruita, que no se sap si és fruita o és flor, va tan unida al nom de Sòller.

“KATALUNA ESPERANTISTO”

OFICIALA ORGANO DE

KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO

Membra kotizajo: 3'50 p.; Grupoj: 1'20 por membro.

Jarabono: 6 p. enlande kaj 6 sv. fr. internacie. Provekzemplero 2 respondkuponoj.

Federacia sidejo kaj redakcejo: carrer València, 245 - BARCELONA

FEDERACIAJ GRUPOJ

Esperantista Klubo Palma
Mesquida, 6 ent. Palma de Mallorca
Empordanana Ebenajo
(Girona) Armentera
Esperanta Nesto
(Joventut Katòlica) Ripollet
Frateco
Plaço Pi i Margall, 14. Vendrell
Gerona Espero
(Creu Roja) Girona
Lumon
St. Antoni, 64. Terrassa
Studentia Juneco
(Seminari) Girona
Aplec
Mendizàbal, 3. Sabadell
Bela Espero
Carretera de Vich, 41. Manresa
Esperanta Idealo
Mossèn Verdaguer Sta. Coloma Farnès
Esperantista Amikeco
Plaça Bernardí, 10. Manlleu
Esperanta Burĝono
(Centre Democràtic) Rubi
Internacia Frateco
(Coop. La Colmena) Sta. Coloma Gramanet
Paco kaj Amo (Soc.)
Planeta, 16, pral. Barcelona
Barcelona Stelo
Marquès Duero, 101. Barcelona
Barcelona Esperanto-Societo
Bretón Herreros, 18, 1. Barcelona
Esperantista Grupo «Sollerica» Soller

Artés: Sro. Manuel Monrós
Armentera: Empordanana Ebenajo
Banyoles: Sro. Joan Aulina
Figueres: Sro. Carles Varela
Girona: Sro. Josep M-a Dalmau
La Garriga: Sro. Joan Blancafort
Mahó: Sro. S. Ortega Barceló
Manlleu: Sro. Marian Vilardell
Manresa: Sro. Josep Albagés
Mataró: Sro. Francesc Torres
Molins de Rei: Sro. A. Canals
Monistrol de Montserrat: Sro. F. Orobitg, Pastro
Palafrugell: Sro. Francesc Sagrera
Patau de Montagut: Fino. Lluïsa Bargés
Palma de Mallorca: Sro. Narcís Bofill
Reus: Sro. Enric Agudé
Ripollet: Sro. Josep Planas, Pastro
Rubi: Sro. Joan Ratés
Sabadell: Sro. J. Bracons
St. Adrià del Besòs: Sro. S. Arnella
St. Martí Sapresa: Sro. Joan Rieradevall
Sta. Coloma de Farnès: Sro. Pere Costa
Sta. Coloma de Gramanet: Internacia Frateco
Sallent: Sro. Lluï Solé
Sóller: Sro. M. Arbona
St. Feliu de Pallarols: Sro. J. Colllelldevall
Terrassa: Sro. Ramon Marsà
Teyà: Dro. Jacint Barrera
Vendrell: Fino. Marià Julivert
Vich: Sro. Pere Farrés
Vidres: Sro. Josep Macià
Vilanova i Geltrú: Sro. Jaume Fort
Vilassar de Mar: Sro. Pere Domènech

LOKAJ DELEGITOJ

Ager: Fino. Maria Plans
Almúnia de Castellví: Sro. Pere Esvertit
Ametlla de Merola: Sro. Miquel Arpa

Ni bezonas delegiton en ĉiu loko kie ni havas membron. Fervoruloj bonvolu sin turni al la sekretario de K. E. F.



KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

DE LA KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO KAJ
DE LA INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ

Nia devizo: *Maro estas gutaro* Redakcio: Carrer València, 245 - BARCELONA

DIREKTORO: S. ALBERICH-JOFRÈ

Redaktoroj: Delfi Dalmau, Jaume Grau Casas, Marian Solà

Respondo al «Sennaciulo»

Se mi ne timus la ruĝan krajonon, mi prezentus al la legantoj de K. E. tre spritan artikolon, kiun la oficiala organo de S. A. T., n.º 42, de la 15 julio, dediĉas al ni, por ke «sinceraĵ laboristoj foriru el nia naŭza kaj abomena medio, kiu nur celas nebuligi ilian klaskonscion».

Mi nomas la aluditan artikolon sprita, ne kun la celo ofendi la anoniman verkinton aŭ la redaktoron de la samlingva kolego, sed nur pro tio ke serioze oni ne povas konsideri la subjektivajn asertojn de homo, kiu estas regata de klasa ŝovinismo kaj juĝas pasie kaj erare.

«Tiu federacio estas de multaj jaroj direktata de ekleziuloj. Ĝi distingigas nun pro klerikala naciemo. Oni faras religiajn paroladojn; oni benas kongresanojn, kaj tio vere naŭzas, indignas konsciulojn».

Cu oni povas paroli pli maltrafe? Mi sendos la ekzempleron de «Sennaciulo» al certa katolika grupo lastatempe stariginta en Barcelona, kiu ne aliĝis al K. E. F. pro tio ke laŭdire ni estas anarhiistoj.

Mi ne bezonas difini niajn ideojn kaj mi ne povas respondi laŭdece al «Sennaciulo», sed mi povas aserti, ke neniu ideo timigas nin kaj ke la neŭtraleco de multaj K. E. F-anoj superas la ruĝecon de multaj S. A. T-anoj.

Legante la pritraktatan artikolon, oni ricevas la impreson, ke ĝia verkinto estas *naciulo* kaj ne *sennaciulo*. Alie oni devus konkludi, ke S. A. T-anoj havas tre malaltan ideon pri sennaciecaj kaj lingvaj aferoj.

«Ili estas tre falsaj. Ili nur pretendas influi nesingardemulojn. Ili neŭtraleco estas nevidebla, kaj tamen ili ĝin propagandas. Kiaj paradoksoj! Sub tiu masko ili kondukas Esperantismon al preĝejoj, al burĝaro, pere de la kongresoj kaj revueto».

Brave! Nenio pli sincera, pli ĝusta, jen mi vidas la estrantojn de K. E. F. en pastra robo prediki ĉe la grupoj kaj laŭdi la dehoran labortagon.

S. ALBERICH JOFRÈ

Vi kaj mi

Mi estas kvazaŭ kruda ter',
senfrukta, malfekunda; —
vi estas varma la somer'
kun superflu' abunda.

Mi estas densa praarbar',
ne homo ĝin profanas; —
vi estas hela lumomar',
en kiu ĝi sin banas.

La erikej' sen lim', sen fin',
mi estas senmezura; —
vi super ĝi etendas vin,
velurtapiŝ' purpura.

Mi estas kvazaŭ ranunkol'
velkanta, senodora; —
floranta estas vi viol'
alloga, multkolora.

Al nuda ĉambro sen ornam',
sen lumo, mi similas; —
vi estas kvazaŭ lampoflam',
blindige tiu brilas.

Mi estas roko el glaci',
neimageble granda; —
la varma suno estas vi
ĝin forfluidiganta.

Vi estas mia falsdiin'; —
se mi en ĉerko kuŝus,
vi certe revivigus min,
se vi min nur ektuŝus.

JAN VAN SCHOOR

Menciita en la XII Internaciaj Floraj Ludoj.



Pro... kaj Por...

Esperanto, Oficialigita lingvo en Kuracista Kongreso. — En la internacia Kongreso por la studado de la tropikaj malsanoj okazonta en Tokio dum la nuna jaro, la kongres-lingvo estos Esperanto, ne la angla, kiel en pasintaj jaroj. Profesoroj Ogata, Mishi kaj aliaj jam anoncis ke ili uzos la internacian lingvon por siaj komunikaĵoj kaj fakaj laboroj. Krome, la Japana Scienca Akademio okazigis balotadon inter siaj anoj pri la demando de internacia helplingvo. Pri la unua demando: Ĉu estas necesa tia lingvo en la sciencaj rondoj? — ĉiuj akademianoj senescepte (43-anoj) jese respondis. Pri la demando: Kiu lingvo decus esti alprenita, 24 anoj balotis favore al Esperanto, 18 anoj gardis sian opinion kaj nur unu balotis favore al alia lingvo. (Elĉerpita el la «Revista de Medicina y Cirugia de la Habana»).

La interna ideo de Esperanto

De la komenco de la Esperanta movado oni parolis inter la anoj de tiu movado kaj dum internaciaj kongresoj pri «Interna ideo».

Sed neniam oni klopodis doni klaran koncepton pri la esenco de tiu ĉi ideo.

Ĝi estas «interna», kaj per tiu vorto mem oni esprimis, ke ĝi ne estas io klara difinita. Ĉar ĝi ne estis klare konscia al ĝiaj adeptoj. La esenco de ĝi kuŝis en la subkonscio. Oni nur sentis ĝin, kiel oni sentas la esencon de muzikaĵo, neesprimebla per vortoj.

Tia stato de aferoj estis komprenebla en la komenco de la movado, kiam la *verdismo* de Esperanto estis afero tute nova. Kvankam ni ĉiuj ĝuis la feliĉon de la «nova sento», ni tamen ne povis klare priskribi, kio en tiu nova sento konsistas, kaj kio precipe estas la noveco de ĝi. Same infano ĝuas la feliĉon de la vivo subkonscie, ne komprenante kaj ne povante kompreni la eternan valoron de la vivo, kiun li nur tempe travivas.

Sed same kiel estas la devo de inteligenta homo doni al si klarigon de la esenco kaj celo de la vivo, estas devo de movado plenaĝa klarigi al si sian esencon, la forton, vivigantan ĝin.

Kaj la movado esperantista jam transpasis la jarojn de unua infaneco, kaj decas al ĝi formuligi la filozofian bazon de ĝia «interna ideo».

Por fariĝi tute klara, ĝi devas esti liberigata de ĉiuj nebulaĵaj frazoj, de esprimoj pure poetikaj, kaj devas esti prezentata en formo logika kaj precipe *vera*. Vera, — tio estas, fidela al la vivo.

Ni kutimis paroli pri internacieco, pri la detruo de la muroj inter la popoloj, pri la formiĝo de «unu granda rondo familia».

Sed tiu ideo de internacieco ne estis io nova. Longe antaŭ la naskiĝo de Esperanto jam ekzistis movadoj pleje internaciaj, kiel ekzemple la movado socialista. Ni tamen pretendis, ke ni venigis en la mondon «novan senton», kaj «novan vokon».

La celo de la kreinto de nia lingvo kaj movado estis la forigo de la baroj, kiuj dividas unu popolon de alia. Do la nacieco de la diversaj popoloj ne estis neata de la komenco. Ne la fakto, ke la homaro estas dividata en diversaj naciaj grupoj, estis priplorinda, sed la fakto ke tiuj naciaj grupoj ne komprenas unu la alian.

Sekve de tio, tute logike, la celo atingota estis ne la forigo de la naciaj diferencoj, sed la interkomprenigo de tiuj grupoj. Kompreni signifas koni, profunde koni la objekton, kies komprenon ni serĉas.

Kia estas la motivo, kiu igas nin deziri tiun komprenon de aliaj nacioj? Estas evidente, ke ĝuste tiu motivo estos la «interna ideo» de nia celado.

Ni devas daŭrigi nian ĉi-rilatan pristudon, elirante el personaj interesoj. Interesoj en la plej alta senco de tiu vorto.

Kaj pro tio mi forlasos la vorton «ni», kaj parolos pri «mi», kondiĉe ke

tiu «mi» ne signifas la aŭtoron de tiu ĉi artikolo, sed lin same kiel la leganton.

Tuj kiam mi forlasas senpensan infanecon kaj fariĝas homo pensanta, mi deziras ekkoni min mem, scii, kiu mi estas, kiaj estas la eblecoj en mi vivantaj, kaj ĉu mi estas nur efemera gasto en la Universo min ĉirkaŭanta, aŭ se ne, en kia rilato mi staras kun ĝi.

Post longa profunda studo kaj ripenso, mi venas al jena konkludo.

Ĉio ekzistanta estas certa manifestiĝo de certa tutampleksa Unueco, kiu mi nomas Dio.

Dio estas ne videbla al homaj okuloj, nek ekkonebla en lia vera plenesenco al la homa intelekto.

Sed se eĉ mi ne povas vidi Dion, nek ekkoni Lin, mi tamen povas vidi kaj efektive vidas Dion en la diversaj formoj, en kiuj Li sin manifestas.

Jen, montaroj, maroj, astroj kaj kometoj, kaj fulmoj kaj tondroj, vivo kaj morto, ĉio ajn, ĉio ajn ĉirkaŭ mi estas formoj, en kiuj sin manifestas Dio.

Mi, kiel unu parto de la tutaro, estas ankaŭ unu formo, en kiu sin manifestas Dio.

Ne ekzistas io ajn, krom Dio, en tempo kaj penso antaŭa al Li. Sekve ĉio ekzistanta estas manifestiĝformo de nenio alia krom Dio.

Sciante tion kaj bone komprenante tion, mi konvinkigis, ke se mi volas ekkoni min mem, mi nepre devas peni al la ekkono de Dio, kies manifestiĝformo mi estas. Sed mi ne povas ekkoni Lin en lia plej ampleksa perfekteco, ĉar Li estas videbla kaj ekkonebla nur en la diversaj formoj en kiuj Li manifestiĝas.

La unua devo, kiu starigas antaŭ min, estas sendube la devo de la plej eble perfekta studado de mi mem, de miaj ĝojoj kaj doloroj kaj de la kaŭzoj ilin naskintaj. Mi devas studi la specifikan koloron de mia pens — kaj sentmaniero, la en mi vivantaj eblecojn ekkoni kaj travivi ĉion min ĉirkaŭantan.

Atenta ripenso klare diras al mi, ke mia spirito, mia animo ne estas io, kion mi mem ellaboras. Mi povas nur perfektigi ĝin, same kiel mi povas perfektigi la formojn de mia korpo. Sed same kiel mi heredis la formojn de mia korpo de miaj gepatroj kaj pragepatroj, same mi heredis de ili la formiĝon de mia cerbo, sekve ankaŭ la manieron de mia pensado kaj sentado, unuvorte la manieron de mia travivado.

Do, el mia natura deziro ekkoni min mem sekvas logike la deziro kaj neceso por mi bone koni la evoluon de la nacio, en kiu mi naskiĝis. Ĉar mi estas la rezulto de generacioj vivintaj antaŭ mi, mi nepre devas koni la vojon de la evoluo de tiuj generacioj por bone kompreni ĝian rezulton, kiu en tiu speciala kazo estas mi.

Tiu intima konatiĝo kun la historio kaj spiritalaboro de mia nacio fariĝas por mi plejvalora ilo, per kiu mi ekkonas min mem, sed ĝi fariĝas por mi ankaŭ gravega fonto de konsolo kaj de anima refortiĝo en momentoj, kiam mi sentas min malfeliĉa kaj komencas dubi, ĉu mi estas nature bone ekipita por la batalo en la vivo.

Tiaj horoj estas por ĉiu normala homo la plej gravaj en lia vivo. Tiaj horoj lasas sur lin senkompare pli grandan signon ol iaj horoj de senpensa ĝojado kaj ridado.

En tiaj horoj de persona malfeliĉo, en horoj, kiam mia koro sangas pro iu doloro, en horo, kiam mi ekdubas, ĉu mi povos superi la malfacilaĵojn de la vivo, kiam mi ekmalesperas pri mia propra persona forto de sinteno en la batalo por la vivo, kiu estas batalo ĉiama por la ekkono de Dio, — mi turnas min al la libroj de la geniuloj de mia nacio, aŭ al la pentraĵoj, en kiujn ili enmetis iliajn ideojn pri spaco kaj koloro, pri la mondo vidata, aŭ al iliaj muzikaĵoj, en kiujn ili enblovis iliajn kordolorojn kaj vorte neesprimeblajn esperojn. Mi turnas min alivorte al la spirita heredaĵo, kiun miaj praaĵoj transdonis al mi. Kaj tiam antaŭ miaj okuloj elkreskas grandioza kolono de lumo. Kaj mi rigardas tiun kolonon, kaj ĝiaj radioj iom post iom disfluas tra la vejnoj de mia animo. Kaj pro tia disfluo mi sentas konsolon kaj refreŝigon animan. Kaj tio okazas pro la sekvantaj kaŭzoj.

Mi scias bone, ke mi, kiel filo de mia nacio, laŭ naturaj leĝoj de heredo, nepre ricevis de miaj ge — kaj pragepatroj la saman forton kiu ebligis ilin krei tiun kolonon de lumo. Kaj konsciante en tiu momento, ke tiu forto herede vivas en mi, mi konvinkigas ke kaŭze de tiu heredita forto mi nepre devas esti kapabla superi malfacilaĵojn de la vivo kaj kontraŭstari ĉion, kio staras sur la vojo de mia ekkono de Dio.

Kaj la rezulton de la spirita laboro de mia nacio mi konsideras sankta kaj bela, ĉar mi scias ke ilia spirito estas unu el la manifestiĝformoj de Dio, kiu estas la fonto kaj unua kaŭzo de ĉio bela kaj sankta.

Tio estas la kaŭzo, sekve de kiu ĉiuj nacioj de la antikvo kaj de la nuntempo nomas iliajn patrujojn sanktaj kaj iliajn lingvojn sanktaj. «Sankta Rusujo», «Sankta Polujo», «Sankta Germanujo» ktp.

Kaj efektive tia koncepto estas tute ĝusta, tute prava, tute logika sekvo de la plejfilozofa vero, ke ĉio ajn estas manifestiĝformoj de Dio.

Sed la nacioj diverslandaj kaj diverslingvaj, dividitaj per fortaj «muroj de miljaroj» blinde kredis, ke nur ilia lando, nur ilia lingvo estas belaj kaj sanktaj. La aliaj estis «barbaraj», kiel kutimis diri la antikvaj Grekoj, aŭ «mutuloj», kiel sin esprimis la malnovaj Slavoj.

Kaj en tio konsistis la plej grava eraro, kiun la homoj ĉiulandaj faris. La noveco de la mondrigardo, kiun ni alportis en la mondo, konsistas en la konscio, ke ne unu certa nacio estas sankta kaj bela, nacio de Dio, sed ke ĉiu nacio de homaro estas egalsankta kaj egalbela kaj egaldieca. Egale en la rango, en la valoro. Sed ne egala en la maniero kaj formo de tiu sankteco.

Ni ne neas la diferencon de la naciaj karakteroj. Ĉar tia neado estus sama kiel la neado de la naturo mem.

Homoj, trovantaj sin sub influo de certaj klimataj, faŭnaj kaj floraj kondiĉoj evoluas animkarakteron, korespondan al la naturo ilin ĉirkaŭanta. La animo de homoj respegulas la formojn en kiu Dio manifestiĝas en la naturo de certa lando.

Ju pli la homo estas inteligenta, ju pli lia animo estas delikata, des pli forta estas tia respegulo.

La tasko de la psikologio estas eltrovi la leĝojn, laŭ kiuj tiu respegulado fariĝas. Tiu problemo ne povas okupi nin, por kiuj estas grava nur la fiksado de tiu vero.

Ĉar ĝi estas vero, ĉiu penado al la forigo de la naciaj diferencoj estas penado aŭ de frenezuloj aŭ de mensoguloj. Forigu la movadon de la tero, forigu la diferencojn klimatajn, la sunon forigu kaj la astrojn, kaj nur tiam malaperos la nacioj, sed kun ili la tuta homaro, la tuta vivo.

La prijeso de la naciecoj certe faras senenhava la tendencojn de certaj kiuj sin organizas en grupoj «kosmopolitaj» aŭ «sennaciecaj». La sennaciecismo nenie povas efektive kunligi homojn, eĉ se ĝi sendube povas kunligi ilin per frazoj, bele sonantaj al la oreloj, kiuj povas nur aŭdi, sed ne transfluigi la aŭdataĵon en la vejnojn de la animo. Io kunliganta diversajn homojn devas esti pozitiva. Sed nenio negativa povas esti kunligilo. La fakto, ke mi ne estas lilio, ne kunligas min kun la maro, kiu ankaŭ ne estas lilio. Same la fakto, ke mi ne estas Ĥino, ne kunligas min kun Japano, kiu ankaŭ ne estas Ĥino. Sed kio jese kunligas min kun la Japano estas la vero, ke ni ambaŭ estas manifestiĝformoj de la sama Dieco.

Sed valora estas por mi la Japano nur, kiam li efektive estas Japano. Ju pli la Japaneco en li estas perfekte evoluinta, des pli valora li estas por mi. Ĉar tiam mi povas plej perfekte lerni la japanan formon, en kiu Dio sin manifestas, kaj tiamaniere kompletigi mian koncepton de la multampleksa Esenco de Dio, tial alvenante al pli bona kompreno de Tiu, kies unu formo de manifestiĝo mi estas.

La prijeso de nacioj estas antaŭkondiĉo por ĉiu praktika kaj fruktoplana laboro al la interpacigo de ili. Tiu prijeso estas nova. Oni ĝis nun klare ne esprimis la forton de la nacia spirito kaj precipe la valoron de ĝi.

Sed ĝuste en niaj tempoj la konvinko pri la nepra ekzistado de la nacioj fariĝas pli kaj pli ĝenerale rekonata.

Elirante el tiuj konsideroj ni povas kompreni, kial nuntempe ĉiuj, eĉ la plej malgrandaj naciaj grupoj batalas por la plifortigo kaj eĉ revivigo de iliaj naciaj kulturoj. Pruvoj: la malgrandaj popoloj de la antaŭmilita Rusujo, la Retoromanoj en Svisujo, la Kimroj, Skotoj kaj Iroj en Britujo, la Judoj en Palestino, la Katalunoj en Hispanujo ktp.

Precipe la revivigo de la Kimra kulturo en Britujo estas tre rimarkinda. Dum jarcentoj la plej granda parto de tiu popolo parolis angle. La kulturo angla, ege forta kaj riĉa kaj brila, tamen ne sukcesis estingigi la internan fluon de naciaj sopiroj kaj revoj de la Kimroj. Kaj post centjara dormo tiu nacioto nun reviviĝas kaj faras plej superhomajn penojn por rehavigi al si propran animon kaj lingvon. Ĉar en tiuj jarcentoj ili ne efektive parolis angle, sed estis devigataj paroli ĝin. Ili parolis angle per la buŝoj, sed ilia angla lingvo estis subkonscia traduko de pensoj kaj sentoj Kimraj.

La forta deziro ekkoni sin mem kondukis ilin al la konscio de la nece-

so komenci, por la atingo de tiu celo, vivon veran, sinceran, kaj la vereco estas nacia, ĉar homoj estas en vereco, sekve de feraj leĝoj de la naturo, naciaj.

Do, la deziro ekkoni min, igis min deziri ekkoni la nacion, en kiu mi naskiĝis.

La rimedo por la ekkono de la spirito de mia nacio: diligenta studo de ĝiaj tradicioj, ĝiaj kreadoj en ĉiuj branĉoj de la vivo.

Sed vera kono neniam riceviĝas de la studo de la objekto mem, kiun mi deziras ekkoni.

Perfekta kono estas ĉiam rezulto de komparo, kiel ĉiu scienco estas komparado.

Kun ju pli da aliaj objektoj mi komparas tiun de mi studatan, des pli veran kaj perfektan ideon mi ricevas de ĝi.

Same, por profunde ekkoni mian nacion mi nepre devas studi, kaj profunde studi la aliajn naciojn de la mondo. Studante ilin, kaj komparante ilin kun la mia, mi eltrovas la diferencojn. Kaj plej ofte estas la diferencoj kiuj atentigas min al iu kvalito de mia nacio, kiun mi neniam estus observinta sen tiu komparo.

La deziro de profunda kono de aliaj nacioj fariĝas per mi sankta, ĉar mi klare konscias ke tiu kono, kaj nur ĝi, reale kondukos min al la ekkono de mi mem, kio estas la celo kaj la sento de la tuta mia vivo.

Kaj por tiu celo estis eltrovita la ideo de Internacia Lingvo. Mi nepre devas havi lingvon, kiun mi rigardas sankta en la sama maniero, en kiu mia frato de alia nacio, kiun mi volas ekkoni, ĝin rigardas tia.

Kaj estas pro tio tute ne mirinde, ke ĝuste la esperantistoj de diversaj nacioj faras sian eblon por disvastigi la konon de sia nacio inter alilingvaj Esperantistoj. Pruvo: la Poloj, Bulgaroj, Katalunoj ktp., eble subkonscie, sed plejcerte estas gvidataj de la deziro frate helpi al aliaj esperantistoj ekkoni la nacion por ke ili povu vidi kaj ĝui la de ili prezentatan formon de Dia sankteco.

La konvinko, ke ĉiu nacia memeco estas unu el la manifestiĝformoj de Dio, igas nin alte respekti, kaj ami ĉiujn el tiuj naciaj grupoj.

Kaj la amo tia, la amo al Dio esprimita en la amo al spiritaĵaj formoj de Lia manifestiĝo, estas la interna ideo de nia Esperanta movado, de la Esperantismo.

Mi bone scias, ke samaj problemoj, kiuj okupas min, okupas ĉiun homon *naskitan de virino*. Kaj tio igas min duoble ami lin, kaj rigardi lin kiel fraton.

Kiam ni unuafoje kunvenis sub la verda standardo en Bulonjo, ni aŭdis nian Majstron preĝi al la «potenca, senkorpa mistero, fortego la mondon reganta». La plej rimarkinda loko en tiu preĝo estas la vortoj: «*Ho, kiu ajn estas Vi, forto mistera, aŭskultu la voĉon de preĝo sincera, redonu la pacon al la infanaro de granda Homaro*».

Aŭdinte, kaj poste leginte, kaj re- kaj releginte tiujn strofojn, ni ĉiuj

sentis, ke la Majstro kvazaŭ eltiris ilin el nia propra koro. Ĝi estas preĝo de ĉiu homo pensanta, kies pensado ne estas malvarma, objektiva, sed kies pensobjektoj kaj rezultoj fariĝas, post la profunda studo, vive sentita, varmiganta kaj viviganta la animon. Por tia homo ankaŭ la pure intelektaj operacioj estas ĝuoj estetikaj. La divido de nia anima vivo en arto, scienco kaj filozofio estas akceptebla sole por **profesiaj** profesoroj de universitatoj. Sed por homoj vivaj kaj sincere konantaj sian vivon, ankaŭ scienco kaj filozofio estas arto, kaj ankaŭ tiuj povas emociigi ilin.

Kion do signifas la alvoko de homoj, tiel vivantaj, al Dio, pri kiu ili diras: «Ho, kiu ajn estas Vi?» Ĝi estas sincera konfeso, ke ni ne scias, kiu Li estas, sed ke ni profunde, per ĉiuj nervoj de nia animo, sentas, ke Li ekzistas, kaj ke nia plej arda deziro estas la deziro Lin ekkoni.

Kaj bonege, plej profunde, ni scias, ke nur Li povas redoni la pacon. Redoni la pacon ne kiel objekton, kiun Li, troviĝante ekstere de ni, donos al ni, kiel homo donas al alia ian aĵon. Sed doni la pacon, enpenetrante en la animojn de homoj.

La pacon? Kion ĝi signifas? Kia estas paco atingota de ni?

Oni kutime kontraŭstarigas al «paco» la «militon». Sed tia antitezigo estas ege malfilozofa, malvera.

Ne pri tiu paco mi, t. e. mia animo, preĝas al Dio, t. e. al la animo de la mondo. La antitezo al «paco» estas la negativeco de la «malpaco». Malpaco, formanganta kaj turmentanta mian animon, malpaco interne de mi mem.

Konstanta batalo okazas en mi. Opinioj batalas kontraŭ opinioj, virtecoj kontraŭ pasioj, ideoj elpensitaj kontraŭ senkonscie naskitaj per si mem.

Tiu malpaco estas la sekvo de la nekonado de Dio, de la nepovo trovi Lin kaj la kunrilaton, nepre ekzistantan inter mi kaj Li. Nur kiam mi klare vidos, kiamaniere mi troviĝas en nepre al mi destinita loko, kiel membro kompletiganta la harmonion de la Universo, mi ĉesigos la konstantan kuradon de mia penso de loko al loko, kaj mi ekĝuos la kvieton de la rigardo de la «ĉiela rozo», por uzi la simbolon de Dante Alighieri.

Tiu malpaco persona estas la plej grava kaŭzo de la malpaco socia kaj politika. La milito estas nur la fina elrompiĝo de la lafo, kiu sin kolektas en animoj de homoj dum jaroj kaj jardekoj.

La fino de militoj neniam estos sekvo de politikaj kontraktoj, eĉ sigeligitaj de centoj da subskriboj de plej fortaj kaj aŭtoritataj potenculoj.

La fino de militoj povos esti kaj estos sekvo de la interna paciĝo de ĉiu individua homo. Tio estas la sekvo de la ekkono plena kaj klara de la «potenca, senkorpa mistero», «kiu ajn estus Li».

Bela estas tiu konfeso, bela pro ĝia senkompara sincereco. Kaj tiu «kiu ajn estas Vi» egale estas aplikebla al homoj de ĉiuj religioj. La diro de iu: «Mia religio estas la sole ĝusta» estas aroganteco nepardonebla.

Kaj jen dum kongresoj Esperantistaj, kiam homoj diverslandaj kunvenas kun komuna al ĉiuj konscio turmentiga, ke ni ne konas Lin, t. e. nin

mem sufiĉe bone kaj klare, kaj kun la komuna deziro, Lin ekkoni, ni sentas la veran Esencon de Li ŝvebanta super ni.

La komunecon formas ne la negativo de la nepovo, sed la pozitivo de la konscio mem, kaj la deziro superi la nepovon.

Kaj tiam ni sentas: Jen, jen la nevidebla, sed sentita. Mi, kiel naciato tia, vidas certan koloron de la lumo de Dio serĉata, kaj la sama lumo, iranta tra la nacie aliforma lenso de alia naciato, montriĝas al tiu lasta en koloro alia. Pli bela? Malpli bela? Nek pli nek malpli, sed alie. Kiu havas la malmodestecon diri. «Mia animo estas pli bela ol tiu de mia najbaro?» Ĉiuj estas egalvaloraj, egalsanktaj ĉar ĉiuj estas manifestigformoj de la sama forto mistera.

La komuna lingvo estas ekstera simbolo de la Unueco de Tiu, kies manifestiĝformoj ni estas, kaj kies ekkonon ni serĉas. Sed kun tempo, kun daŭra edukado, ĝi ĉesas esti simbolo pure ekstera, sed fariĝas simbolo interna, ĉiam sentita de ni.

La frateco de la komuna serĉado de la granda forto mistera, jen la interna ideo, pri kiu ni parolas.

Kiel videblan simbolon de tiu Ideo ni havas la verdan koloron. Ĉar vidu, vere ĝi estas la koloro de la vivo. Kie ajn mi venas, mi unue vidas vivon en la verdeco de la kamparaj herboj kaj de la arbaraj folioj. Ĝi, la esenco de la vivo, apartenas al ĉiuj nacioj de la mondo.

D-RO EMMANUEL OLŠVANGER

Premiita en la XII Internaciaj Floraj Ludoj



XIII^{aj} Floraj Ludoj *

LISTO DE PREMIOJ

(daŭrigo)

- IX — de Barcelona Esperanto-Societo: ptoj. 50' — por Temo libervola
- X — de du Sennomuloj: ptoj. 50' — por Temo libervola
- XI — de Dro. Ramon Torres Carreras: ptoj. 100' por Temo: Kiu estas la plej bona sistemo por varbi multajn adeptojn?
- XII — de Grupo Lumon el Terrassa: ptoj. 50' — por Temo libervola
- XIII — de Societo Paco kaj Amo: ptoj. 50' — Temo: Kiel ni sukcesigos niajn kursojn.
- XIV — de «Heroldo de Esperanto»: Kvinjara abono. Temo libervola.
- XV — de «Internacia Radio-Revuo: Dumviva abono. Temo: Kion kaj kiel mi aŭdas per Radio.

DELFÍ DALMAU, sekretario
Carrer València, 245 — Barcelona

* Vidu la antaŭan numeron de *Kataluna Esperantisto*.

Kiel mi fariĝis Esperantisto

Al mia amiko Josep Alberich

La afero, kompreneble, interesos neniun, sed ĵus mi legis sur «Svenska Esperanto-Tidningen» artikoleton de samideano Fredo en kiu li rakontas ke li lernis Esperanton por distri sin de akra dentdoloro, kiun li suferis. Ankaŭ legis mi, antaŭ ne longe, sur «La Suno Hispana» alian artikolon, de D-ro. Cortezo, sciigantan ke li ekkonis nian lingvon dum la resaniĝado de lia rompita brako. Plue, en la letero de S-ro. Paul Fructier, aperinta kiel antaŭparolo en la vortaro de S-roj. Inglada kaj López, la eminenta pioniro bele priskribas siajn unuajn paŝojn en Esperanto, kaj diras ke li eklernis la lingvon dum iuj tagoj de deviga hejmorestado pro malbona vetero en farmodono.

Laŭ la cititaj ekzemploj kaj aliaj elĉerpeblaj, oni rajtus kredi ke Esperanto estas ĉefe afero tre taŭga por forigi la enuon aŭ neniigi la tedon, kiel speco de vasta ŝarado aŭ de amuziga vortkruciĝo. Tial, mi deziras klarigi ke almenaŭ estas en la esperantistaro unu samideano, kiu studis la Zamenhof, an verkon havante la korpon ne difektita kaj bonfarta, kaj la spiriton bonhumora kaj senteda.

Do, antaŭ malmultaj jaroj mi nenion sciis pri Esperanto kaj mi akceptis kiel tre bona kaj konvena la konatan difinon: «Esperanto estas universala lingvo parolata de neniuj».

En tiu tempo mi ofte iris ĉe la ĉiutagan kunvenejon de komercistoj kaj financistoj de nia urbo kie ili pritraktas siajn aferojn kaj negocojn. La vasta salonego zumas kiel abelujo pro la bruado de centoj da konversacioj; la komizoj flugetas de rondeto al rondeto montrante siajn specimenojn aŭ transdonante sin reciproke dokumentojn ĉiuspecajn. Unuavide kunfandiĝas amase la tuta ĉeestantaro, kiel kunfandiĝas ĉiu ŝafo en la amaso de la brutaro (pardonu la retorikan figuron), sed pli detale observante ĝin oni distingas per iliaj vestoj kaj sinteno la kamparanajn negocistojn de la enurbaj komercistoj; oni rimarkas la junajn oficistojn vikle irantajn de kliento al kliento; la ĉarkondukistojn, fortajn kaj muskolajn, atentajn al la ordonoj de iliaj dungistoj, kaj la grizharajn kaj dikventrajn ĉefojn kaj direktorojn de la diversaj firmoj, ripoze sidantajn en iliaj postenoj aŭ, kiam nepre, traŭrante la salonon per siaj paŝoj mallertaj kaj anasaj.

Do, iun tagon, la laboro ne estis multa. En angulo fariĝis rondo de junuloj, kiuj babiladis pri diversaj temoj. Ĉeestis, inter aliaj, unu, kiu ornamis sian butontruon per la kvin-pinta verda stelo. Kredante ke ĝi estas la insigno de iu sporta societo mi demandis lin pri ĝi. Tiam li klarigis la signifon de tia stelo kaj elokvente propagandis Esperanton, la facilecon kaj belecon de la lingvo kaj la laŭdindan celon de ĝia interna ideo. Li donacis al mi «Esperantan ŝlosilon» kaj mi promesis tralegi ĝin.

Kaj mi tion faris. Mi kunportis la broŝureton en la kontoron, kaj inter

sumo kaj notaĵo en la ĉeflibron, mi studis la gramatikon kaj lernis la vortareton. Speciale mirigis min la kunmetado de la devenaj vortoj per la prefiksoj kaj sufiksoj.

Mia konvertinto, la junulo de la verda stelo, poste pretigis al mi pli vastajn lernolibrojn, invitis min al kunvenoj kaj festetoj ĉe la esperantaj rondoj kaj, unuvorte, li tute varbis min al la esperantismo elmontrante al mi idealan mondon antaŭe eĉ ne suspektatan.

Nun, kiam la okazo venas, plezure mi dediĉas al mia unua amiko en Esperantujo la diritajn vortojn, kiel ateston de mia kora dankemo.

JAUME HERP



Bibliografio

(Ni recenzas verkojn duope ricevitajn)

LA MALGRANDA JOHANO de Frederic van Eeden. — Biblioteko Tutmonda N-roj 2 - 4. El holanda lingvo tradukis H. J. Bulthuis. Eldonis Rudolf Mosse, Esperanto- Fakoj, Jerusalemer strasse 46-49, Berlin S. W. 19.—1926, 183 pĝ. 17 × 10 1/2. Prezo aŭ frank. de la unua serio (10 numeroj): 4 R. M. aŭ 1 dolaro.

Fabelsimila verko per kiu la aŭtoro prezentas al ni sub diversaj formoj la erarojn kaj punindajn flankojn de la homoj. Laŭ la tre atentindaj klarigoj, kiujn oni trovas ĉe la lastaj paĝoj de la libro, la malgranda Johano estas aŭtobiografio, libro, en kiu la poeto rakontas la disvolviĝon de sia propa animo. Tiu rakontado disvolviĝas malfacile kompreneble, kaj iafaje la klarigoj aluditaj ne sufiĉas por trafi la ĝustan ideon de la verkinto. Tamen, kiam oni trovas la belajn paĝojn kun la priskriboj pri la naturo aŭ pri la vivo de insektoj kaj bestoj, oni sentas sin ravata de la belo kaj ĉarmo, kiuj fluas torento el la paĝoj.

Ke la tradukinto majstras esperanton ĝuste kaj bele neniu dubos post la legado, sed se kelkaj L. K.-anoj uzas sisteme *spite de*, kial ili ne voĉdonigas la demandon kaj donas al ni definitivan formon? Bedaŭrinde enŝovigis kelkaj preseraroj, kiuj iafaje povus kredigi, ke la tradukinto eraris; pĝ. 143, supra linio, *sian* anstataŭ *lian*.

Pri la laŭdinda preso kaj aspekto de la libro ni parolis en n.º 25, tamen ni ripetas, ke la malalta prezo de la serio meritas ĉian laŭdon kaj ĉies helpon. — SALJO.

ЕТИКО de P. Kropotkin. — Eldonis Sennacieca Asocio Tutmonda. Aĉetbla ĉe ĝia Administracio, Colmstrasse 1, Leipzig-O 27. - 1926, 235 pĝ. 18 × 13. Prezo: 2 R. M.

El la rusa lingvo ni akiris vere interesan kaj gravan verkon, kiun ĉiu konscia homo legos kun vera plezuro. Kropotkin, unu el la plej famiaj sociologoj, per sia Etiko konstruas firman moralan fundamenton, kiun la faktoj kaj ĝustaj argumentoj reliefigas antaŭ la okuloj de la leganto. Ĝi estas unu el la plej kompletaj verkoj en tiu kampo, kvankam, niaopinie, K. Brandt en sia «Fundamento de la moralo» prezentas pli facilajn argumentojn, el kiuj oni tuj elĉerpas perfektan konon de la bono kaj malbono kaj sekve de la moralo kaj malmoralo.

La tradukintoj de Etiko por elpruvi sian revoluciemon faris lingve revolucian tradukon. Se iafoje ili trafas ĝustan neologismon, multfoje ili maltrafas. Tute arbitre estas enkondukataj ŝanĝoj en la vortoj, kaj se ni pretendus analizi iom ĉiujn ŝanĝojn, ni devus plenigi multajn paĝojn. Estas rimarkinda la akuzativigo de prepozicio de: «...kiu vidigis sole ekstermadon den malfortaj de la pli fortaj»; «...ke li eĉ allasis kruelan persekutadon den kristanoj». Ni simple dirus «de la malfortaj per la pli fortaj» kaj «al la kristanoj». Tia precizigo ofte superfluas ĉar el la kunteksto oni facile komprenas la sencon.

Ni rekomendas la libron ne nur pro ĝia instrua senco sed ankaŭ pro tio ke ĝi povas instigi laboristojn pli atente rigardi nian movadon kaj post esploro alligi al ĝi. — SAJJO.

ANO DE L' RINGLUDO. — DINKO SIMUNOVIĈ. Traduko de S-ro Fran Janjiĉ. Volumo el Internacia Mondliteraturo, kiun eldonas la Firmo Hirt & Sohn en Leipzig, paĝoj: 86.

Dankon de la tuta esperantistaro meritas kaj laŭdon la firmo Hirt por la bela kolekto da diverslandaj literaturaĵoj per kiuj ĝi nin regalias. Ne ekzistas pli konvinkiga pruvo de la taŭgeco kaj universaleco de Esperanto ol tiu ĉi ĉiurilate bonega kolekto: ĉar kiel ĝi estus al ni eble ĝui verkaĵojn el tiel multaj diversaj lingvoj, kelkaj tre malvastaj, kaj tiel lerte kaj konsciencie tradukitaj de enlandanoj mem, por kiuj propra lingvo devas havi neniun sekreton? Tiuj pensoj venis al mi kiam mi legis la ĉarman kaj romantikan rakonton de Simunoviĉ, kiu tre agrable, pere de alloganta intrigo, raportas al ni pri tiu malnova turniro de la ringludo, en pacaj tempoj rememoraĵo de la militperiodoj de la kroata gento. Mi legis ĝin kun granda plezuro kaj mi sincere deziras ke miaj kunfederacianoj ankoraŭ tro malmulte legemaj estu inklinaj partopreni mian ĝojon kaj tiucele aĉetu la libron, kiu ja kostas nur 1,60 germanajn markojn, kaj ĝin atente legu.

Pri la lingvo mi povas diri nur laŭdon, ĉar mi tute forgesis ke mi legas en Esperanto, sekve en lingvo kiun oni devas ankoraŭ severe observi. — M. S.

INSULO DE FELIĈULOJ. — AUGUST STRINDBERG. Traduko de S-ro Oskar Frode. Volumo el Internacia Mondliteraturo eldonita de la Firmo Hirt & Sohn en Leipzig. Paĝoj 69. Prezo 1,60 germanaj markoj.

Verkon de tiu ĉie konata sveda aŭtoro oni legas ĉiam avide kaj interese. En nia propra kataluna lingvo ni havas tradukon de romano de Strindberg,

kaj en Esperanto ankaŭ kelkajn mallongajn tradukojn de teatraĵoj. La kerno de la romano kiu okupas nin estas la jena: ŝipo plensargita de pasaĝeroj, plejparte krimuloj kiujn oni sendas al amerika kolonio, estas detruita de ventego kaj la fornaĝintaj homoj venas en insulon, kiu pro sia abundeco de fruktoj kaj komforto de klimato, estas paradizo kaj povas esti nomata la insulo de feliĉuloj: la homoj ne devas labori por nutri kaj vesti sin, kaj sekve ili vivas pace; leĝoj, religioj, aŭtoritatoj, familia kunvivado, tio estas, ĉiuj karakterizaĵoj de nia nuna socio, estas malaperintaj pro superfluo: paradiza feliĉo floras super ĉiuj tiuj homaj estaĵoj. Ŝajnas al mi tamen ke la aŭtoro ne akurate juĝis ĉiujn flankojn de la homa animo, precipe forgesis la nerefenblajn seksajn altirojn, kaj eble iom da naiveco montriĝas en la penso ke la homara paco kaj kvieteco povas esti facile garantiitaj se nur la zorgoj pri nutrado kaj vestado estos facile kaj senpene kontentigitaj: ne sole tio povas pacigi la socion, la problemo estas multe pli vasta ol Strindberg ĝin supozas per tiu ĉi verko. Post kelka tempo de loĝado en la Insulo de Feliĉuloj tertremo devigas al ĝiaj loĝantoj elmigri rapidege kaj ili venas al alia insulo kiu plu ne havas la samajn feliĉigajn kvalitojn. Malbona klimato devigas ilin ĉasi kaj kovri siajn korpojn per bestaj feloj; por manĝi ili ankaŭ estas devigitaj al ĉasado, krom tio la ĉasaĵo ne estas tre abunda: pro tiu ĉi kaj multaj aliaj malfacilaĵoj la homa socio tie formita revenas iom post iom al la antaŭa stato: leĝoj, ĝendarmoj, registoj, religio, familio k. c.

Mi rekomendas la atentan legadon de tiu verko al ĉiu kiu interesigas pri la grandaj problemoj de la homara vivado. — M. S.

BARBARAJ PROZAĴOJ. PRUDENCI BERTRANA. Traduko de Sro. Jaime Grau Casas. Volumo el Internacia Mondliteraturo eldonita de la Fermo Hirt & Sohn en Leipzig. Paĝoj 59. Prezo 1,60 germanaj markoj.

Jam de longe ni esperis ke la nomo de kataluna verkisto riĉigu la jam longan liston de la Internacia Mondliteraturo; ni danku do hodiaŭ al nia amiko Jaime Grau pri lia ĉiurilate bonega traduko. Bertrana estas aŭtoro kiu havas tre riĉan vorttrezoron kaj sekve kiun oni ne glate kaj facile esperantigas. La libro enhavas la rakontojn: «La forlasita vojo», severa priskribo de la mistero de la sovaĝaj arbaroj; «La kabanoj de la karbfaristoj» kiu konatigas nin kun la loĝejoj de tiuj liberaeraj laboristoj; «La kamenoj de la gastejoj», kiu tre ĝuste pentras la krudajn homojn kiuj apud ili varmigas kaj kiel finon, kelkajn ĉapitrojn el la romano «Josafat», kiu sufiĉas por vidigi la karakteron de la romano. Eble oni trovos tiujn ĉi fragmentojn iom tro krude verkitaj; estas eble ke la legado de la tuta verko povas ŝanĝi la juĝon al kiu la fragmenta legado kondukas. Mi esperas ke la libro sukcese disvendigos. — M. S.

UNIVERSALA ESPERANTISTIGILO, eldonita de Benson School of Esperanto, Inc. n.º 3,16 th.Ave., Newark, N.Y. — U.S.A.

En la granda lando kie aperis Berlitz, la unua vera kaj efika progresiginto de la lernigo de lingvoj. En la lando kie Cortina kaj Rosenthal, kaj

aliaj plifaciligis per utiligo de fonografaj diskoj tian studon, en tiu plej okcidenta kaj moderna lando, kie la universala civilizacio atingis supron, ankaŭ aperis por Esperanto kaj por Pedagogio mirinda progresado sub la nomo «Universala Esperantistigilo», kiu faciligos kaj agrabligos la taskon de instruantoj kaj lernantoj de Esperanto.

Tie ĉi estas nek kvante nek cele loko por teknika klarigo de la juvelo pedagogia por nia lingvo, de la Benson School. Sed kiel vera progreso, ĝi estas videbla kaj komprenebla je simpla rigardo.

Ĉiuj, kiuj deziras konstati la veron de nia aserto, sendu amerikan dolaron por Universala Esperantistigilo por Katalunlingvanoj al la supre citita adreso de la Benson School. — Mi nenium komercan rilaton havas kun Benson. — Do.

PROVERBS ESPERANTO—ENGLISH. — Eldonis Brita Esperantista Asocio, 17 Hart Stret, London, W.C. 1. 1926. 159 pĝ. 9×6. Prezo: 1 \$ 6 p. plus afranko 3 p.

Jen tre bela kaj luksa libreto bindita Iede, kun ora tranĉrando supre. Se grandformate la «Kataluna Antologio» estas rimarkinda unikaĵo en la esperanta literaturo, malgrandformate, estas vera unikaĵo la «Proverbs Esperanto-English». — Ni diru, ke ĝia enhavo konsistas je 580 proverboj el la Zamenhofa proverbaro kun angla similsenca ekvivalento kaj oni komprenos, ke tiu libreto estas tre bela donacaĵo, tre utila lernigilo de Esperanto por anglalingvanoj, kaj bona lernigilo de angla lingvo por Esperantistoj. Ĉiuj Zamenhofaj proverboj estas tiel belstilaj kaj bonsencaj kiel «Plej facile promeso rimiĝas kun forgeso» (pĝ. 116). — Do.

Pro... kaj Por...

Manifesto kontraŭ konskripcio. — Dum la granda milito homoj en ĉiuj landoj decidis liberiĝi por ĉiam el la katenoj de la militarismo, kaj, kiam paco venis, la Ligo de Nacioj estis bonvenata kiel naskito de tiu espero. Estas nia devo certigi ke la terura suferado de milito neniam reokazu. Ni alvokas por definitiva paŝo al tuta senarmigo, kaj forigo de militarismo el la mensoj de civilizitaj nacioj. La plej efika movo al tio estus la tutmonda forigo de konskripcio. Do: ni petas ke la Ligo de Nacioj proponu la forigon de deviga militservo en ĉiuj landoj kiel unua paŝo al reala senarmigo. Per tutmonda forigo de konskripcio milito fariĝus pli malfacila. La registaro de lando kie ekzistas konskripcio ne havas multe da malfacilo pri ekmilito, ĉar ĝi povas silentigi la tutan popolon per elsendo de mobiliza ordono. Kiam registaroj, por sia subteno, devos dependi de la libervola konsento de la popolo ili estos devigataj esti pli zorgemaj rilate al eksterlandaj aferoj. En la unua provaĵo de la Interkonsento de la Ligo de Nacioj, Prezidanto Wilson proponis fari konskripcion nelaŭleĝa en ĉiuj aliĝintaj landoj. Estas nia devo renaskigi la originalan spiriton kiu kreis la Ligon, spirito partoprenita de multaj militintoj, kaj konfesita de multaj Ŝtatistoj de koncer-

nataj landoj. Per tutmonda forigo de konskripcio ni povas fari decidan paŝon al paco kaj libereco. Do: ni alvokas al ĉiuj homoj bonvolaj helpi krei en ĉiuj landoj publikan opinion, kiu kaŭzos ke la registaroj kaj la Ligo de Nacioj faru tiun-ĉi definitivan agon por liberigi la mondon de la spirito de militarismo, kaj malfermi la vojon al nova epoko de libereco interne de la nacioj, kaj frateco inter ili.

Noto: La komitato responda je ĉi-tiu manifesto, danke ricevus pluajn subskribojn adreseblajn al H. Runham Brown, 11, Abbey Road, Enfield, Middlesex, Anglujo.

Raporto pri la XVIII Kongreso. — La 2-an. de oktobro, en Ateneu Barceloní kunvenis multaj esperantistoj por aŭdi la raporton de D-ro. Marian Solà pri la lasta Universala Kongreso en Edinburgo. La ĉeestantoj ĝuis la facilan parolon de nia reprezentanto en la aludita Kongreso, kies priskribon faris pli interesa granda nombro da belaj kliŝoj, kiuj donis al la aŭskultantoj trafan bildon pri la brilo de nia tutmonda festo.

Niaj gastoj. — Dum la lasta monato ni havis la plezuron akcepti S-ron. Maurice Hyde el Rabaul (Nov-Gineo), kiu pasigis kelkajn tagojn en nia lando vizitante la grupojn en Vich, Barcelona kaj Girona.

S-ro. Hyde, kiu antaŭ dek-du jaroj vizitis unuafoje Katalunujon, multe laŭdis la kulturon de nia popolo, kiun li admiras kaj amas.

Lian malproksiman landon, kiun ni ekŝatis el liaj priskriboj kaj informoj, ni baldaŭ povos koni profunde pere de lia nuntempe presata verko.

Chesterton kaj Esperanto. — Niaj britaj samideanoj, atentante nian alvokon al la Brita Esperantistaro (vidu n-ron 24), skribis al S-ro. Chesterton informante lin pri nia movado kaj progresoj.

Lastatempe, la 11 sepbro. S-ro. Stevens, sekretario de S-ro. Chesterton, respondis al B. E. A.: S-ro. Chesterton komisias al mi vin sciigi, ke li ricevis vian leteron. Li min petas vin informi, ke li subtenas ankoraŭ, ke latinon oni povas uzi tre bone kiel internacian lingvon.

Ŝajnas al ni, ke komentario estas superflua. La respondo per si mem evidentiĝas, ke eminentuloj pensas iaforte tiel naive kaj senfundamente kiel senaboculoj.

Ni devas esprimi al B. E. A. nian publikan dankon por la laŭdinda kaj ĉiuflanke imitinda laboremo kaj aktiveco.

D-ro. M. Solà, honora membro de "Aplec". — La 24-an. de oktobro "Aplec" Esperanta Grupo (Sabadell) malfermis siajn kursojn brile kaj sukcese. Sub la prezido de la urbestro diversaj esperantistoj paroladis antaŭ multnombra publiko pri la celo de nia movado.

Ĉe la fino de la festo la prezidanto de «Aplec» donis al D-ro. M. Solà tre riĉan albumon enhavantan la subskribon de multaj esperantistoj kaj grupoj, kiel ateston de danko al nia pioniro por la longjara batalado sur nia kampo kaj precipe por la kunlaboro, kiun la grupo ĉiam trovis ĉe nia malnova kunbatalanto.

Simpatia festo. — En la bela kaj fama urbo Sevilla, oni solenigas entuziasme, 6 Januaro, la feston de la Epifanio, tiu festo de la «Tri Reĝoj»: Melhoro, Gasparo kaj Baltasaro.

Rilate je tiu festo la loka kultura Societo «Ateneo de Sevilla» organizas belan kaj allogan kavalkadon por disdoni inter la malriĉaj kaj malsanaj infanoj, loĝantaj en aziloj kaj hospitaloj, diversajn ludilojn, librojn, pupojn kaj dolĉaĵojn donacitajn de bonfaremaj personoj.

En tiu kavalkado oni distingas la «Tri Reĝojn» riĉe ornamvestitajn kiujn akompanas diversaj muzikistaroj, horo de infanoj, heroldoj, paĝioj, soldatoj, ĉiuj kunportantaj diversajn flagojn kaj originalajn standardojn.

Tiu kavalkado trairas la urbon, kaj ĝi estas rigardata de ĉiuj personoj, precipe de la infanoj, kiuj atendas senpacience, la disdonadon de la donacaĵoj pere de la Tri Reĝoj de l' Oriento, dum la noktmezo de la 5 al 6 Januaro, laŭtradicie.

La pasintan jaron, la fraŭlinoj de Sevilla Esperantista Grupo aranĝis dekdu belajn pupojn vestitajn per tipaj vestoj, reprezentantaj diversajn naciojn de la mondo, por donaci ilin al la Reĝoj Melhoro, Gasparo kaj Baltasaro, kiuj poste, dum tiu kavalkado disdonas karese kaj afable, ĉiajn donacaĵojn ricevitajn, inter la malfeliĉaj infanoj de aziloj kaj hospitaloj, ĝojigante tiel dum kelkaj tagoj la koron kaj senton de tiuj kompatindaj infanoj.

Por fari pli ampleksa tiun donacon, la Delegito de U. E. A. en Sevilla, sin turnis ankaŭ la pasintan jaron per la Esperantaj gazetoj «Esperanto» kaj «Heroldo de Esperanto» al la samideaninoj alilandaj, petante donacaĵojn por tiu festo, kaj efektive li atingis de esperantistinoj de kelkaj landoj, ke ili sendu pupojn arte kaj tipe vestitajn.

Sed por la festo de la proksima jaro, 6 Januaro 1927, la laborema Sevilla Esp. Grupo, petas al ĉiuj esperantistoj ke ili diskonigu tiun belan feston inter la sindonemaj, enlandaj samideaninoj pri alsendo de pupoj arte vestitaj kaj prefere, tipe ornamitaj laŭ naciaj kostumoj.

Oni devas konstati, ke per tiu donacaĵo la Sevilla Esp. Grupo faris grandan propagandon favore al nia kara helpa lingvo Esperanto, ĉar la pupoj donacitaj estis la plej bele ornamitaj, kaj samtempe rigarditaj de la tuta loĝantaro.

La pupoj devas esti altaj 30 aŭ 40 centimetrojn kaj ĉiaj donacaĵoj devos alveni en Sevilla antaŭ la 24 de Decembro de 1926.

La donacaĵojn de libroj, ludiloj, pupoj, dolĉaĵoj ktp. oni bonvole sendu al la jena adreso: «Grupo Esperantista Sevillano» Real Sociedad Económica Sevillana de Amigos del País - Rioja, 25 - SEVILLA (Hispanujo).

Al ĉiu donaconto, krom la plej kora danko de tiu Grupo, oni sendos ankaŭ rememorigaĵon de tiu Kavalkado.

Gesperantistoj! Atentu bone pri tiu festo, kaj ne forgesu la simpatian kaj bonfareman peton de Sevilla Esperantista Grupo. — *Karolo.*

Tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto» estas submetita al la militista cenzuro.

KATALUNA ANTOLOGIO

KOMPILITA DE
JAUME GRAU CASAS

416 paĝoj 22 × 16

Aĉetebla ĉe la Barcelonaj Grupoj kaj ĉe «Kataluna Esperantisto»,
València, 245, je 12 ptoj.

Por la resto de la Iberia duoninsulo kaj eksterlando oni sin turnu
al S-ro. Eduard Capdevila, Carders, 29, Barcelona.

Prezoj kun rekomendita poŝto enkalkulita: Por Iberio: 13 ptoj. Por
eksterlando: 15 ptoj. 9 ŝilingoj, 11 svisaj frankoj aŭ 2 dolaroj.

Laŭ la juĝo de kompetentaj esperantistoj, la Kataluna Antologio
estas unu el la plej valoraj verkoj en Esperanto.

Aĉetu baldaŭ la libron kaj diskonigu tra la tuta mondo la altan
gradon de kulturo de la miljara kataluna lingvo.



KVAR PUNKTOJ

instigas nepre aboni al

HEROLDO DE ESPERANTO

Tio estas:

Ĉiusemajna

Aktuala Ilustrita

Grandformata

Senpagajn specimenojn petu de
la administracio:

HORREM b. KÖLN, Germanujo
Reprezentanto en nia lando

F. MONTSERRAT

STR. VILLARROEL, 107, 2.^{on}, 2.^a

BARCELONA

Radio Barcelona

CASP, 12 - BARCELONA

Esperanto Programo

17 de novembro je la 22.^a

Esperanto kaj la Scienco, de Dro. M.
Solà.

15 de decembro je la 22.^a

Neceseco de lingvo internacia por la
Scienco, de Dro. Jobé.

Esperantistoj, kiuj aŭdas niajn prele-
gojn bonvolu informi Radio Barcelona.
Per tio ili helpos nian radiomovadon.

L'ESPERANTO A COP D'ULL

ALFABET. — A, b, c (ts), ĉe (tx), d, e (é), f, g (gue, gui), ĝ (tj), h (aspirada), ĥ (fortament aspirada), i, j (y), ĵ (j), k, l, m, n, o (ó); p, r, s (ss), ŝ (ix), t, u, ŭ, v, z (s).

L'accent tònic recau sempre sobre la penúltima síl·laba (paraules planes)

LA

article determinatiu

el, els
la, les

J

(sona y)

i es terminació del plural

faktoj, manoj
okuloj, animoj

IN

sufix per al femeni

heroino, reĝino
katino, leonino

O

terminació substantiu

lakto
urbo
komerco
(comerc)

A

terminació adjectiu

blanka
antikva
komerca
(comercial)

I

terminació verb (infinitiu)

kompreni
labori
komerĉi
(comercial)

E

terminació adverbial

klare
konstante
komerce
(comercialment)

CONJUGACIÓ DEL VERB

AS

temps present

Mi skribas
Jo esĉric

IS

temps passat

skribis
esĉrivi

OS

temps futur

skribos
esĉriurĉ

US

mode condicional

skribus
esĉriiĉa

U

mode imperatiu o subjunctiu

skribu
esĉrigui

Els verbs compostos es conjuguen amb el verb auxiliar *esti*, i les formes de participi *ant*, *int*, *ont* (actiu: present, passat i futur) i *at*, *it*, *ot* (passiu: present, passat i futur). *Mi estas skribanta*, jo estic escrivint. *La letero estis skribata*, la lletra fou escrita

DECLINACIÓ DEL SUBSTANTIU

En esperanto, tota paraula que rep l'acció d'un verb (complement directe) acaba en **N**.

Li vidas min. Ell em veu.
Mi vidas lin. Jo el veig.

Mi skribas la leteron. Jo esĉric la carta.

En els altres casos, la relació que hi ha entre dos substantius és expressada per mitjà de les preposicions *al*, *de*, *kun*, *per*, *sur*, *super*, *sub*, *en*, *ekster*, *tra*, *trans*, *antaŭ*, *post*, *inter* i altres.

Al la patro, per la plumo, sur la tablo.